

Daurigebla agrikulturo

Bedaurinde multaj historiaj kulturoj kolapsis pro la elherpigo de la grunda fekundeco.1-3)

Jen nur kelkaj konsiloj, kiuj ancorau estas tre simplaj, kaj mi subkomprenas, ke chiam necesas rigardi la regionajn kondiĉojn: klimato, tipo de la grundo, ktp., Bonvolu viziti la retejojn:

- Ne lasi la grundon nuda sub la suno, pluvo & vento, ĉar tiam erozio forvoras la grundon, eĉ ne remarkite, ĉar temas pri multaj jaroj. Aparte rapide erozia damagho videblas, kiam la humusa tavolo estas malalta, kaj la temperaturo kaj sun-radiado alta. Kiel videbla en la regiono de kelkaj pluvarbaroj.
- Kiam granda tereno estas sen arbara protekto ankau shanghighas la (mikro)klimato, ĉar la (miksita au eĉ praa) arbaro estas perfekta shirmilo kontrau atako de la suno kaj pluvo.
- Prefere ne plugi tutan kampon, sed uzi malprofundan enmiksighon de plantorestajhoj en la grundon - poste la vivantaro en la grundo faros la digeston, kio rezultigas en pli fekunda grundo.
- Prefere ne plugi malebenajn kampojn, kaj se jes - plugi laulonge de la isohipsoj (linioj de la sama alteco).
- Rapide re-semigi plugitan grundon, ĉar plantoj bremsas la erozion: ghi bremsas la falantajn pluvojn kaj iliaj radikoj tenas la grundon. Ili ankau protektas kontrau la suno, kio bruligas (nevideble) la organikan substancon en la grundo; kaj sekan grundon povas forblovi la vento.
- Kelkaj grundoj ne toleras plugadon, ĉar la erozio estos pli rapida ol la rekreado de nova grundo - la sekvo estas, ke post kelkaj jaroj au jardekoj la kampo ighas sen-fekunda. Tie taugas la t.n. permakulturo.
- En regionoj proksime de la ekvatoro, eblas kultivi legomojn inter vicoj da frukt-arboj au arbustoj, por eviti troan sunighon kaj sekighon.
- Tute ne plugi herbejon en duon-seka regiono; ghi taugas nur por pashtejo; sed oni atentu ke la gregoj ne kresku al tro granda amaso. Shafoj kaj kaproj estas detruemaj al la herboj.
- Ne forjheti vegetajhon, sed doni ghin al kompost-stako; ankau fekajhoj taugas por kompostigado, sed ghi ne rekte tushu legomojn, por eviti epidemiojn.
- Eviti monokulturon, eĉ se ghi donas pli da mono, ĉar tiel la grundo rapide "lacighas" kaj invado de insektoj minacas. Uzi la intershanghon de la specoj: grenoj, leguminozoj, en-teraj kreskajhoj (terpomoj, betoj).
- Eviti kemiajn pesticidojn.
- Ne uzi genetike modifitajn (GMO) semojn, ĉar tio signifas eternan dependecon de iu firmao; kaj havas la saman riskon kiel kredito.
- Kemia fekundenzo ne estas stabila, dum organike kreita fekundenzo pludauras longe.
- Ne troigu la fekundigon de herbejo; magra herbejo montras plimulton da valoraj floroj, kiuj stabiligas la biodiversecon kaj allogas diversajn insektojn kaj birdojn. Ghi ankau estas pli valora nutrajho por la brutaro.
- Akvumado ne chie taugas, se tiel oni tiras salojn al la surfaco, kiuj senvalorigas la grundon.
- Longdaura uzo-raĵto kreas respondecon rilate la grundon, kaj tiel evitas ghies senzorgan ekspluaton.
- Ne labori per kredito, ĉar la risko estas tro alta, ke malbona rikolto kausos financon kolapson.
- Planti malgrandan terenon per mane au per simplaj mashinoj povas esti pli efika, ol aĉeti multekostajn mashinojn per kredito. Nafto iam elherpighos, klopodu redukti vian dependecon de nafto; tio ankau rilatas la transportojn 3).
- Sed en lando kie floras industrio, kutime la salajroj estas tro altaj kaj malebligas simplan manlaboron por simplaj produktoj. "Biologie/organike" produktoj bezonas pli da laboro, sed je loka au regiona nivelo enspezigas pli.

Cititaj libroj:

1) Jared Diamond, "Kollaps" (germana traduko, el la angla)

Priskribas la evoluon kaj kolapson de minimume 10 diversaj civilizacioj.

La plej gravaj parametroj estis: erozio de agrikulturita grundo, troigo je la vivnivelo, malpaco & militoj kun najbaroj). Kutime la evoluo okazas malrapide, sed post iu turnigh-punkto la kolapso estas rapida.

2) David R. Montgomery, "Dreck - Warum unsere Zivilisation den Boden unter den Fuessen verliert", eldonejo www.Oekom.de, ISBN 978-3-86581-197-4; angla originalo: "Dirt - The erosion of civilizations", Univ. of California, 200, 345 p., 24,90 Euro

3) Rob Hopkins, "The Transition Handbook - From oil dependency to local resilience", Transition Books, ISBN 978-1-900322-18-8, 240 p., 12,95 GBP

Retejoj de organizajhoj (lingvo): (de, en) <http://www.weed-online.org>

(de, en, es, fr) <http://www.germanwatch.org>

(de) <http://www.ABL-ev.de>

(de) <http://www.meine-landwirtschaft.de>

(de) <http://www.permakultur-institut.de/>

(en) <http://www.transitionculture.org>